

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto

114

aŭtuno 2018



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva

Eden Park n° 99

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la kasisto

Nicole Lafitte

(ĉe la supra adreso de

Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

31-a de decembro 2018

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

Terure! Estas jam aŭtuno kaj nia federacio devas remeti sin sur la labor-relojn. Mi esperas, ke vi bone profitis la someron kaj pretas nun revigli viajn klubojn. Multaj samideanoj de nia federacio partoprenis en la UK en Portugalio, gratulon al ili! Kaj multaj el ni antaŭ nelonge partoprenis ankaŭ en forumoj de asocioj. Sekve, mi esperas, ke kelkaj pliaj membroj aliĝos al nia federacio. Al ĉiuj, mi deziras forton, entuziasmon kaj bonan laboron!

Dankoj

Dum aŭgusto, mi ankoraŭ estis tro laca pro malsano, kaj ankaŭ iomete mallaborema, por povi dankegi ĉiujn partoprenintojn en la Lisbona UK, kiuj havis amikan penson por mi. Do, dankon al ĉiuj pro la senditaj poŝtkartoj! Nun, resaniĝinte, mi povas denove labori! Tre amike,

Pierre Oliva



18 Provencaĵoj ĝuis
la Universalan Kongreson en Lisbono

enhavo	7	vojaĝemaj eksterlandaj samideanoj	
2	raportoj pri la Lisbona UK	9	paĝo de la komencantoj
5	forumoj de asocioj	10	mesaĝkesto agendo
6	ZEO en <i>Cavaillon</i>	+	dulingva aliĝilo por la staĝo en <i>Le Beausset</i>

Tiel la mondo iras....

raporto pri la UK en Lisbono

Renée Triolle

Kvankam mi jam partoprenis dekojn da Universalaj Kongresoj de UEA, mi ne laciĝas pri tiu internacia festo kaj ĝiaj ŝablonaj aranĝoj. Ĉefa ŝanĝo ĉijare: la homoj daŭre havas la nazon en sia telefono, anstataŭ kapti la okazon diskuti kun apuduloj! Tion ni povis fari dum vicado por surloka manĝo je "socia" prezo, 2,5 eŭroj kaj biero je 0,85! Bona ideo de la organizantoj ĉar la kongresejo (jura fakultato) estis tute izolita, kvankam apud metrostacio.

La UK en Lisbono estis la unua okazanta en Portugalio; ĝi estis organizita de dudeko da homoj, eĉ Brazilanoj aŭ diasporanoj, do evidente estis kelkaj fuŝoj (apero de la taga gazeto "Taĵo nia" meze de la posttagmezo, informoj pri la lokigo de salonoj nur la trian tagon, improvizita rendevutabulo, Movada Foiro en bruega kaj varmega halo) sed la etoso estis familia kaj neformala: multaj mallongaj pantalonoj eĉ dum la Oficiala Malfermo, en italstila koncertejo en la centro de Lisbono.

Ŝablonaj aranĝoj iĝis pli modernaj: kleriga lundo kun tre diversaj paralelaj aranĝoj, ekz. pri planlingvoj aŭ aikido, la arto paroli publike aŭ nekutimaj objektoj de la mondo, programo Erasmus aŭ klerigaj/amuzaj ludoj ktp; rezultoj de la Belarta Konkurso (en kiu brilis francoj) enscenigita; oratora konkurso iĝis Junulara Konkurso pri Publika Parolado kun "oratoroj" sen kostumo aŭ kravato sed improvizadprovo kaj duelo apud preparita

parolado.

Kiel kutime, abundis prelegoj: diverstemaj pri Portugalio, sciencaj kadre de Internacia Kongresa Universitato (feliĉe, ili aperas libroforme antaŭ la kongreso kaj eblos ilin legi poste), sciencaj kafejoj, interaktivaj rondaj tabloj kadre de la kongresa temo "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?", tre diversaj pri koloniado, centjariĝo de la unua mondmilito kaj rifuĝantoj; mi mem intervenis kadre de la "Tago de lernado" pri "Esperanto, ĉu kaŝita interkulturilo?".



Eta grupo el la Provencanoj, kiuj partoprenis en la UK.

Specifeco de la UK estas, ke la programeroj estas tiom multaj, ke ĉiuj travivas la kongreson laŭ sia plaĉo: iuj ekskursas, iuj aŭskultas koncertojn (kaj ĉijare, Jaro de Esperanto-kulturo, okazis pluraj (17) dum la tago, apud la kutimaj vesperaj aranĝoj: mi bedaŭras, ke la korea grupo MAJU tiom laŭte ludis!), iuj sidas en laborkunsidoj (kie UEA decidis pri sia politiko, ekz. ŝanĝo de aliĝo por altiri la milionojn da junuloj, kiuj lernas rete kaj ne sentas sin movadanoj), iuj sidas en lerno-ĉambro por plibonigisian lingvo-nivelon aŭ trapasis ekzamenojn.

Ne eblas citi la 255 programerojn, kiuj ofte karambolas. Mi ekz. malkovris la "teknikan" rolon de origamo kaj bedaŭras, ke mi ne sukcesis viziti la "aŭtorajn duonhorojn", nek la omaĝon al Marjorie Boulton aŭ la 100-jaran jubileon de la pola verko "S-ro Tadeo".

Kiel kutime, Afrikanoj (escepte de kvar) ne ricevis vizon, same Pakistanano, kiu devis prelegi pri sufismo.

Tiel la mondo iras, kiel kantis kaj kantigis Julian el Kubo en la koridoroj.

Rendevuo en pli malvarma lando, en Lahti (100 km norde de Helsinko) en Finnlando en 2019.



Iom pli pri la Lisbona UK

diversaj raportoj de federacianoj niaj

Maggy Combot

Aikido : sur la senfina vojo al harmonio per energio

Mireille Grosjean incis nin pri la Japana sindefenda arto nomata aikido. Ŝi klarigis, kiel nuligi atakon kaj sen dolorigi la kontraŭulon kaj sen uzado de muskoloj. Unue necesas, gvidante la atakanton, malstabiligi lin. Poste eblas plenumi teknikon per ĉiamaj rondaj movoj, absorbante lian energion.

Mireille montris al ni la bazajn ekzercojn, kiujn ni kun plezuro elprovis. Ni tuj sentis la efikon, sed ankaŭ la kompleksecon de aikido.



movo klarigata: *ikkyo omote*

Philippe Combot

Projekto pri komuna katalogo de Esperantaj bibliotekoj

Pluraj bibliotekoj en la mondo posedas gravajn kolektojn de Esperantaj libroj, dokumentoj aŭ arĥivoj.

Ekzemploj estas la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, la biblioteko *Vanbiervliet* en Kortrejko, la biblioteko *Butler* en Barlastono, la biblioteko *Hodler* en Roterdamo, la biblioteko de Greziljono, la biblioteko de Kvinpetalo (kiu posedas la arĥivojn de *Waringhien*), ktp.

Kiel scii, kion posedas tiu aŭ alia biblioteko? Dum tiu UK en Lisbono renkontiĝis bibliotekistoj el la tuta mondo por lanĉi projekton de komuna katalogo.

La ĉefa motoro de tiu ideo estas *Ana Manero*, bibliotekistino en la Hispana Nacia Biblioteko.

La metodo probable uzota por starigi tiun komunan katalogon estas la konstruo de virtuala katalogo: ĉiu biblioteko konservos sian propran katalogon, sed per plia fasado oni povos samtempe serĉi en la diversaj ekzistantaj katalogoj. Anstataŭ tajpi kaj retajpi kaj retajpi titolon aŭ aŭtoron en pluraj serĉomotoroj, oni tajpos nur unu fojon la serĉataĵon kaj la programo sendos la demandon al ĉiuj bibliotekoj, kiuj aliĝos. Tiel la projekto povos iom post iom allogi pli kaj pli da bibliotekoj.

Tiun projekton financos la fondaĵo *Esperantic Studies Foundation (ESF)*, kiu jam subtenas multajn tre bonajn projektojn, inter kiuj la bonega tekstaro.com.

Thierry Spanjaard

Pri naturismo kaj *Espéranto-Provence*



En la UK, INOE havis budon ĉe la Movada Foiro, proponis fakkunvenon pri naturismo kaj ekskurson al naturista strando

Ĉu vi scias, ke *Espéranto-Provence* estas la Esperanta Federacio kiu enhavas la plej grandan nombron da naturistoj? Inter ĝiaj ĉirkaŭ 100 membroj, pli ol 7 % estas ankaŭ naturistoj! Tiu interesa fenomeno verŝajne venas de kombino de kialoj. Nia regiono estas tute favora al naturismo: sufiĉe plaĉa klimato, multaj ebloj sin bani kaj sunbruniĝi nude sur plaĝoj aŭ en naturistaj centroj niaregionaj aŭ proksimaj, vigla naturista asocio (*Association Naturiste Phocéenne*)... Tamen, la ĉefa kialo verŝajne estas la simileco de la valoroj de Esperanto kaj naturismo.

Mi estas estrarano kaj de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista) kaj de nia federacio. Mi ĵus verkis novan retejon por INOE, videblan ĉe www.esperanto-naturismo.org Sur tiu retejo vi trovos informojn pri naturismo por esperantistoj, raportojn pri la pasintaj agadoj de la asocio, detalojn por aliĝi al INOE... kaj tekston verkitan de Provencanino pri la rilatoj inter la valoroj de naturismo kaj Esperanto. Ne hezitu kontakti nin por pli da detaloj.

Laste pri la UK

Pascal Vilain

Miavidpunkte...

En la programo de la UK estis proponitaj, kiel kutime, kursoj pri la lingvo de la gastiganta lando. Mi do ĉeestis la rapidan prezentadon de la portugala lingvo, gvidatan de João José Santos. Ĉu mi nun kapablas paroli lian lingvon?

Kompreneble ne, sed mi ŝatas ĝin, kaj tio gravas, laŭ nia gvidanto, kiu asertis, ke «eblas bone studi lingvon nur se oni amas ĝin!»

Ah! Mi komprenas, kial mi neniam povis bone uzi la anglan: ĉar mi neniam vere ŝatis ĝin. Sed mi pretas defendi ĝin, same kiel iun ajn alian lingvon, se ĝi estas atakata. Kaj tio iel okazis en la Nacia Vespero de la UK.

Kio do okazis ? Fduo-grupoj (evidente en Lisbono!) parole prezentis siajn kanzonojn kaj dancojn. Ideale estus antaŭ-preparado : la portugala grupoj disponigus siajn tekstojn al la LKK-anoj, kiuj tradukus ilin esperanten; kaj dum la Nacia Vespero, la grupoj legus la tekstojn en la portugala, kaj poste LKK-ano en Esperanto. Ideale... jes ja... sed tio ne okazis. Kial? Mi ne scias.

Tial, la portugala grupoj havis la «bonan» ideon prezenti sian programon... en la angla.

Ho ve! Tiam ektondris krioj, plendoj... Kaj mi tuj sentis kompaton por la Portugaloj, kiuj volis plezurigi nin, uzante la laŭdire mondscale konatan lingvon: la anglan.

Kial tiuj krioj?

Ĉu esperantistoj ne kapablas foje esti komprenemaj, toleremaj?

Ŝajne ne se temas pri la angla!

Pro tio, okaze de koncerto de Kajto, *Ankie* – unu el la duopo – diris: « Nun ni kantas kanzonon originale verkitan en la angla... sed ni ne «kuraĝos» kanti ĝin originalversie... en UK! »



Nu... mi povas ĉion kompreni: ke ni ne uzu hegemonian lingvon en UK... ke multaj samideanoj venis el landoj, kie la angla ne multe estas uzata... Konsentite!

Sed toleremo superu ĉiujn aliajn argumentojn, ĉu ne?

Laŭ mi...



lasta foto de Provencaĵoj (ne ĉiuj, bedaŭrinde) antaŭ kongresfino kaj disiĝo. antaŭ ili: fama biciklo de ne malpli fama amiko nia (vidu la suban artikolon)

A vélo jusqu'à Lisbonne avec le Réseau espéranto

La 22an de julio, la retejo "*LADEPECHE.fr*" aperigis longan artikolon pri la renkontiĝo de du samideanoj : *Gilbert Darrieu*, el *Tarbes*, kaj *Alain Rémy*, el *Toulon*.

Ambaŭ estis en Lisbono, sed nur unu, *Alain*, iris tien bicikle: «*Je suis parti de Toulon le 25 avril dernier, je suis passé par l'Allemagne, la Suisse, l'Autriche, la Hongrie, la Slovaquie, la Slovénie et l'Italie. Sur la carte, je trace le trajet et quand je me lève le matin, je ne sais jamais où je vais dormir le soir*».



por legi la tutan artikolon, vizitu [ĉi tiun paĝon](#).

Forumoj de asocioj

La Ciotat (13)

8an de septembro, en la nova urba parko, *Domaine de la Tour*. Evidentiĝis, ke multaj vizitantoj simple promenis en la parko kaj hazarde trafis la Forumon, kie reprezentis 190 asocioj. En la budo de *Espéranto-La Ciotat* deĵoris *Alain, Loukie* kaj *Renée*, malgraŭ forta suno kaj granda varmeco. Ili disdonis 200 kalendaretojn kaj informis dekojn da personoj. Kiel kutime, forte mankis junuloj kaj adoleskantoj. Ni haltigis infanojn, petante, ĉu ili scias en kiu lingvo estas skribita ilia T-ĉemizo kaj ĉu ili scias, kion signifas la skribaĵo. Evidente, neniuj scias... eĉ ne, ke la skribaĵo estas en la angla! Alia demando pri la nombro de lingvoj en la mondo ĉiam levas grandan surprizon. Kelkaj lasis sian adreson; ni vidis, ĉu ili aperos en la publika kurso. (Ĝi komenciĝis la 12an de septembro en *CIQ-Fontsaite*).



Marseille (13)



9an de septembro, *Parc Borely*.

Kiel ĉiujare, la ekspozicimaterialo restas en la aŭto de *Renée*, kiu transportas ĝin de *La Ciotat* al *Marseille*. Tradicie okazas *Vivacité* en Parko *Borely*, kun bele ombraj aleoj aŭ tendoj instalitaj de la organizantoj. Por *Espéranto-Marseille* deĵoris *Thierry, Renée, Chantal* - ĵus reveninta el Grekio - kaj la junaj informadikistoj *Victor* kaj *Eda*. Kiel kutime, necesis kapti la atenton de la preterpasantoj sed multaj longe staris por ricevi informojn pri la lingvo, ĝiaj uzoj ktp. Ni disdonis la tre bonan kalendareton de JEFO kaj notis dekojn da adresoj. Bela panelo de la pluretna urbo vizitis la forumon: araboj, afrikanoj, ĉinoj, hungaroj, "ĉielarkaj" familioj, kiuj ofte unuafoje aŭdis la vorton "Esperanto". (La kurso komenciĝis en *CIRA, 50 rue Consolat - 13001* - la 11an de septembro).

por *La Ciotat kaj Marseille* raportis *Renée T.*

Le Beausset (83)

Kiel kutime, la tutan tagon ni partoprenis en tiu evento. *Christine, Maryse, Monique, Colette, Nicole* kaj *Pierre* deĵoris ĉe la budo. Ni ornamis la tablon, sur kiu la promenantoj povis trovi multe da libroj, revuoj kaj informiloj. Oni tre ofte demandis al ni, ĉu eblas eklerni Esperanton per la reto. Kun plezuro ni proponis plurajn solvojn. Bedaŭrinde, neniuj aliĝis al niaj kursoj. Ĉu ni trovu alian manieron interesi homojn pri nia lingvo? Finfine, estis por ni bela tago; ni multe babilis... kaj malfeliĉe ankaŭ krokodilis !

raportis *Nicole L.* kaj *Pierre O.*



Forumoj de asocioj (sekvo)

Saint-Raphaël (83)

2an de septembro, *Base Nature François Léotard*

Kiel kutime: suno kaj varmo, multaj asocioj ĉiutemaj, kaj abundo de promenantoj.

Sed kion faras promenantoj ? Ili promenas... Ĉu ili vere interesiĝas pri la diversaj budoj ? Se temas pri sportoj, dancoj... jes ! Se temas pri lingvo, despli se ĝi ankoraŭ ne estas bone konata... multe malpli!

Ĉar la estraro de la klubo decidis kunigi la forumon kun la pikniko, kiu ne povis okazi en majo, venis dudeko da membroj kaj simpatiantoj. Bela nombro, ĉu ne? Ĉe la budo, ne mankis do homfortoj por disdoni kalendaretojn kaj faldfoliojn, por informi kaj klarigi... Ne multis la demandoj, neniu decidis aliĝi al la kurso... sed ni semis, ni ja kapablas tre bone fari tion.

raportis Pascal V.



malfacilis havi ĉiujn sur la sama foto!



Manosque (04)

8an de septembro, *Parc de Drouille.*

ZEO-oj en PACA > 7 - Cavillon (84)

En la n° 112 de nia gazeto estis artikolo pri ZEO en *Carpentras*.

Ni restas en la sama departemento (84) kun alia ZEO, ĉifoje en *Cavillon* : «*Rue du Dr Zamenhof*».

Post miaj demandoj pri la strato al la urbodomo, S-ino *Christel Jean*, el la informservo, sendis mian peton al S-ino *Hélène Maignan*, arkivisto de la urbo. De ŝi mi ricevis la jenajn informojn:

«La rue Zamenhof dessert un lotissement non loin du Boulevard Georges Pompidou.»; «La dénomination de la rue du Dr Zamenhof avait été demandée par l'association espérantiste présidée par M. Sangerma (décédé), puis reprise par Mme Thomas dont le mari était concierge à la maternelle des Hautes-Ferrailles. Partie à Avignon après le décès de son mari, elle aussi est décédée. Je ne sais pas à l'heure actuelle, s'il y a une association espérantiste à Cavillon. L'inauguration de la rue a eu lieu en octobre 1988.»

Merci à Mmes Jean et Maignan pour le temps qu'elles ont consacré à satisfaire ma demande !

Pascal V.



Vojaĝemaj eksterlandaj samideanoj

Somero estas sezono favora al migrado de vojaĝemaj esperantistoj, kiuj profitas ĉu la diversajn kongresojn aŭ staĝojn organizitajn ĉie en la mondo, ĉu la eblojn de servoj kiel ekz. la konata Pasporta Servo.

Ĉijare, rekorda nombro da Provencaj iris al Lisbono por la UK, sed ankaŭ eksterlandaj samideanoj elektis nian regionon por siaj ferioj.

Ekzemploj?

Brazila paro el *São Carlos*, *Gilberto* kaj *Aparecida Mene-gasso*, gastis ĉe *Renée Triolle*, en *La Ciotat*, kaj vizitis la ĉirkaŭaĵon.

Du ĉininoj gastis ĉe *Thierry Spanjaard*, en Marsejlo, kaj vizitis la urbon.

(pri ambaŭ eventoj, vidu la sekvajn artikolojn)

Mari-Roza kaj *Pascal Vilain* estis akceptitaj de la germano *Lu Wunsch-Rolshoven*, prezidanto de la asocio EsperantoLand, en sia feria domo en *La Croix-Valmer*.

Ili tie renkontiĝis ankaŭ kun aliaj esperantistoj, i.a. *Gerd Jacques*, el Antverpeno, oficistino ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

Kaj en oktobro vizitos Nicon brita samideanino, *Samantha Poynter*. Renkontiĝo okazos kun la paroj *Wallez*, *Cavelan* kaj *Vilain*.

(Pascal V.)

Brazilaj esperantistoj vizitis nin

Renée Triolle

Paro el Brazilo (ili vivas je 250 km de *São Paulo*) vizitis Provencon, parte sole parte ĉe esperantistoj. Ili vizitis *Marseille*, *Aix-en-Provence*, *La Ciotat* kaj ĉirkaŭaĵojn. Ili senlace laŭdis la avantaĝojn de Esperanto, ĉar vizitante esperantistojn, ili vidas kiel ili vivas, kion ili manĝas (familiaj manĝoj ne similas restoraciajn), vizitas vilaĝojn aŭ urbetojn dum "kutima turisto" haltas nur en grandaj urboj, interŝanĝas pri la landoj, la politiko, ekonomio, edukado ks.

Amika pikniko okazis en *La Ciotat* la 25an de aŭgusto; sabate la 29an, ili vizitis *Le Camp*, *Le Beausset* (kie ili estis varme akceptitaj ĉe la turismoficejo), kaj sub ĉiĉeronado de *Maryse*, nova esperantistino, ili promenis tra la krutaj startetoj de *La Cadière*. Kaj unuafoje ili vidis vinberojn sur vitoj!

VOYAGE ET ESPÉRANTO

Deux Brésiliens sur les traces des frères Lumière

Comment visiter un pays en dépensant le moins possible mais surtout en ayant des contacts directs avec les autochtones ? Depuis des décennies, les espérantistes ont résolu la question avec Pasporta Servo, un service d'hébergement gratuit à disposition des espérantophones, créé en 1974, et une langue internationale.

C'est ainsi que Gilberto et sa femme, venus de San Carlo (à 250 km de Sao Paulo, au Brésil) visitent le sud de l'Europe. Après le congrès italien à San Marino, ils se sont arrêtés une semaine à La Ciotat, de quoi apprécier les calanques, nos collines (et la visite intempestive des sangliers), le musée et la vieille ville, découvrir que les frères Lumière ont filmé à La Ciotat l'arrivée d'un train et que c'est là qu'est née la pétanque.

Pour les espérantistes, ce fut l'occasion de pratiquer la langue et d'en apprendre un peu plus sur la situation écono-



Gilberto et sa femme voyagent, découvrent les richesses de La Ciotat et pratiquent leur langue. / PH. DR

mique du Brésil, les conditions de vie, le système de santé, etc. Ils ont visité également Le

Beausset (qui édite en espéranto les informations touristiques sur le village) avant de conti-

nuer leur périple vers Toulouse et l'Espagne, berceau de leur famille paternelle.

unua kaj kvara maldekstre:

Gilberto kaj *Aparecida*

artikolo en *LA PROVENCE*
eldono *Aubagne*
10an de septembro

Nicole L. kaj Pierre O.

Ni plezure akceptis la paron *Menegasso* el Brazilo. Post la kutima iro al la turismejo de nia urbeto *Le Beausset*, ni vizitis *La Cadière d'Azur*, alian vilaĝeton sur monteto. En tiu loko, ni havis la plezuron havi kiel ĉiĉeroninon *Maryse Caillol*, lernantinon de nia klubo, kiu multe laboris por prezenti sian vilaĝeton. Dankon al ŝi!



Neforgeseblaj tagoj en Marsejlo

Sanoza, el Nanchang (ĉinio)

Mi estas esperantistino el Ĉinio. De la 13a ĝis la 15a de julio, amikino kaj mi vizitis Marsejlon, tre malnovan urbon, kiu havas 2600-jaran historion.

Viziti ĝin estis jam mia revo, kiam mi estis juna.

Unue ni vizitis la malnovan havenon, kiu situas en la urbo-centro. Ĝi estas belega, kun unika stilo. De tie eblas rigardi tute malsamajn pejzaĝojn. Ĝi ankaŭ estas centro de amuzaĵoj kaj havas multajn restoraciojn kun bongustaj manĝaĵoj.

Ni vizitis la katedralon *Sainte-Marie-Majeure*, la abatejon *Saint-Victor* kaj Muzeon. Ni vizitis ankaŭ la Bazilikon *Notre-Dame-de-la-Garde*, konstruitan sur 150m alta monteto. Imponegas tie ora Madono, 9,7 metrojn alta, kiu superas la katedralon. De tiu loko, eblas rigardi la tutan urbon.

Mi estis feliĉa havi la ŝancon povi travivi la francan Nacian Feston kun franca esperantisto. Mi ankaŭ partoprenis en la granda ĝojo de la franca popolo kiam la franca futbalteamo gajnis la Mondan Pokalon. Tiuvespere, preskaŭ ĉiuj restoracioj estis fermitaj. Multe da homoj iris surstraten por festi.



Alia feliĉa momento estis mia bonŝanco uzi malgrandan aviadilon kun nur kvar sidlokoj. Tion mi ŝuldas al nia gastiganto *Thierry*.

Enĉiele super Marsejlo, mi vidis mirindan panoramon, t.e. verdajn montojn, bluan maron, belan riveron kaj majestajn konstruaĵojn. Ĉio similis al pentraĵoj. Kiel bela ĉio estis, kaj kiel feliĉa mi estis!

Dum tri tagoj en Marsejlo, ni estis varme akceptitaj de nia gastiganto *Thierry Spanjaard*. Li multe helpis nin kaj bone aranĝis nian viziton. Fakte, ni tute ne konis lin antaŭ nia vojaĝo al Francio. Pere de Pasposta Servo, mi trovis lin kaj sendis mesaĝon kun peto pri gastigado. Mi estis feliĉa rapide ricevi lian jesan respondon.

Poste, li provizis nin per diversaj informoj pri trafiko, biletoj ktp. Li eĉ afable akceptis nin en alia urbo, Avinjono (ĉar mi eraris pri biletoj) kaj veturigis nin ĝis Marsejlo. Kiam ni atingis lian loĝejon, li tuj preparis por ni bongustajn manĝaĵojn kaj donis al ni ŝlosilojn. Ni tuj sentis nin hejme.

Fine, mi volas tutkore diri: "Dankon al Esperanto! Dankon al sinjoro *Thierry*!"

ĉu vi estas ludema?
se jes, aldonu nomojn
de samideanoj viaj
al ĉiu adjektivo...
mi certas, ke vi kapablos...



Paĝo de la komencantoj



trinki / drinki

Au verbe français "boire" correspondent 2 verbes en espéranto : **trinki** et **drinki**

Attention de ne pas les confondre.


1) **trinki** = boire, prendre en bouche une boisson (eau, lait, vin, bière...) ; avec modération s'il s'agit d'alcool.
exemple de Zamenhof : "**la maljunaj virinoj trinkas brandon**" (sans excès, donc)

2) **drinki** = boire une boisson alcoolisée sans modération

exemple de Zamenhof : "**drinki kiel funelo**" = boire comme un trou - (*funelo* = entonnoir)

vortenigmo

trouvez un mot de 8 lettres composé de six parties suggérées par l'illustration (facile en écrivant les 6 parties)



Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de Esperanto-Info

1 - gramatika

a) Per kio vi vidas? Mi vidas miaj okuloj.

1 - pro ; 2 - por ; 3 - per

b) Pro tio, li fariĝas maljuna, li ne plu bone vidas.

1 - kiu ; 2 - ke ; 3 - kio

c) li estas juna, li ne estas atentema.

1 - ĉar ; 2 - kaj ; 3 - do

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "elradiki", "eltiri" aŭ "eltordi" por traduki la francan "arracher"

1 - extraire :

2 - déraciner :

3 - un secret :

d) elektu "decido", "haltigo" aŭ "halto" por traduki la francan "arrêt"

1 - action d'arrêter :

2 - action de s'arrêter :

3 - décision :



Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. En kiu urbo okazis la 2a Universala Kongreso?

a- Ĝenevo ; b- Kembriĝo ; c- Dresdno

2. Kiu verkis la poemaron Preter la vivo en 1923?

a- Baghy ; b- Schwartz ; c- Boirac

3. Unu el la jenaj diskoj ne estas de Kajto? Kiu?

a- Lokomotivo, rulu nun ; b- Masko ; c- Karnavaletto

4. Kiomaĝa estis Zamenhof, kiam li aperigis la "Unua libro"-n ? a- 22a b- 26a c- 28a

5. Kiu korelativa finaĵo signas kaŭzon?

a- el ; b- al ; c- e

6. Kiu estas la plej ampleksa lago en la mondo, krom Kaspia Maro?

a- Aralo ; b- Supra-lago ; c- Viktoria-lago

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a : 1 ; b : 1 ; c : 2

2 - vorto-trezora

ĉ1 : lerni ; ĉ2 : instrui ; ĉ3 : ekscii

d1 : helpi ; d2 : akcenti ; d3 : apogi

Solvoj de la demandoj

en EP 112

printempo 2018

EN vortenigmo

"post-e-n" + o = posteno

Superzam'

1 a > 20

2 c > Songô sub pomarbo

3 c > 1989

4 b > 28 ; 5 c > om

6 b > Puruso (3 379 km)



El la mesaĝkesto de la legantaro

Thierry Spanjaard

Dankon, Pascal, pro via grandega laboro por redakti nian federacian gazeton. Ĝi pli kaj pli pliboniĝas je ĉiu eldono!

respondo de la red.

Dankon, Thierry. Espereble plaĉos al vi la kelkaj ŝanĝoj en ĉi aŭtuna numero.

Maggy Combot

Dankon pro la gazeto. Mi jam rimarkis foton de ni ĉiuj, la tradukitan aliĝilon por la staĝo MES (kiun mi tuj sendos al Suwako, japanino)...

respondo de la red.

Parteto de nia gazeto flugis do al Japanio!

Se japanino(j) partoprenos en la venonta MES, ni do scios, ke tion ni ŝuldas al vi.

Martine Demouy

Dankon, Pascal, pro la sendo de via gazeto. Mi atente kaj interese legis ĝin tuj post ricevo. Interalie mi povis kun ĝojo 'revidi' Georgi, kiun ankaŭ ni akceptis en Périgueux. Baldaŭ ni renkontiĝos kun vi kaj Mari-Roza en Lisbono, ĉu ne?

respondo de la red.

Ho ve... la Lisbona UK iĝas iom post iom fora memoraĵo... Estis plaĉe tie retrovi unu la alian.



la homoj daŭre havas la nazon en sia telefono, anstataŭ kapti la okazon diskuti kun apuduloj!
el teksto de Renée T., je la paĝo 2a



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

décembre 1-2 - Le Beausset : fin de semaine culturelle
(bulletin d'adhésion sur les pages suivantes)

décembre - Avignon et Saint-Raphaël
"Zamenhof-festoj"

2019 mars 2-9 - Les Issambres
Méditerranée Esperanto-Semajno
*(bulletin d'adhésion joint au n° 113
ou à télécharger [ici](#) sur notre site)*

en France

octobre 13-14 - Arrout (09)
stage pour améliorer son niveau
toulouse.esperanto-midipyrenees.org

octobre 13-14 - Paris : stage par la méthode Cseh
thierry_saladin@yahoo.fr

octobre 27 / novembre 4
Château de Grésillon - Baugé (49)
AŬTUNE : 7èmes vacances pour enfants, familles, grands-parents ; cours, chorale Interkant et autres activités, programme pour les ados et les enfants
gresillon.org/automne

en Europe

décembre 27 / janvier 3 - Königswinter (Allemagne)
4ème Luminesk' - Fête du Nouvel An
andreas.diemel@web.de

décembre 27 / janvier 3 - Wiesbaden (Allemagne)
17ème Rencontre du Nouvel An
pour familles - programme pour les enfants
lu.esperanto@gmx.de

KULTURA SEMAJNFINO en LE BEAUSSET - 2018
la sabaton 1-an kaj dimanĉon 2-an de decembro

staĝejo : *Maison des Frères, 16 rue Estienne d'Orves – 83330 Le Beausset*

dormoĉambroj kun duŝejo kaj necesejo - littukoj surloke - kunportu tualettukon kaj buŝtukon

kiel atingi ĝin ? En *Le Beausset*, ŝildoj gvidos vin. Sed antaŭe :

trajne : stacidomo de *Saint-Cyr* ; buse : el *La Ciotat* aŭ *Toulon* ; buslinio 13 : 1 € por studentoj aŭ plejaĝuloj (kondiĉe, ke vi jam havas « *Cars 13* »-legitimilon)

aŭtomobile : aŭtoŝoseo *La Ciotat-Toulon*, elirejo *Saint-Cyr*

programo : **sabate** : ekde la 9a : akcepto, kafo - 10a/12a : kursoj - tagmanĝo - 15a/19a : kursoj - vespermanĝo - 20a30 :

dimanĉe : 9a/12a : kursoj - tagmanĝo

laborgrupoj :

1 : *Mari-Roza Vilain* : paroligo de komencantoj

2 : *Renée Triolle* : konversacio por progresantoj

3 : *Pascal Vilain* : studlaboro por lertuloj

manĝoj : Kiel kutime, pri ili zorgos *Pierre Oliva*.

tarifoj : aliĝo al la programo : 22 € (36 € por paro) ; entenas paŭzajn kafojn

kompleta restado kun tri manĝoj, tranoktado kaj matenmanĝo : 58 €

unuopa manĝo kun trinkaĵo (se vi volas nur kunmanĝi) : 12 €

por pliaj informoj : Pierre OLIVA - 06 76 55 57 23 / nlpolecamp@gmail.com

resendota, antaŭ la 17a de novembro, kun la pago per ĉeko
al Pierre OLIVA - 99 Eden Parc, 2772 Montée du Vieux Camp, 83330 LE CASTELLET

nomo :

adreso :

retadreso :

telefonnumeroj (fiksa kaj/aŭ portebla) :

- aliĝas al la Kultura Semajnfino en *Le Beausset* la 1-an kaj 2-an/12 2018
- partoprenos en la jena laborgrupo : 1 : 2 : 3 :
- tranoktos, partoprenos la tutan aranĝon, kaj pagas do 58 €
- aŭ mendas la jenajn manĝaĵojn kaj pagas 12 € x =
- sabatan tagmanĝon : sabatan vespermanĝon : dimanĉan tagmanĝon :
- havas apartan dieton (precizigu, ni provos kontentigi vin) :

pagas do per ĉeko al *Espéranto-Provence* :

aliĝkotizo : 22 € (aŭ 36 € por paro) + restado : € = sume : €

⚠ la aliĝkotizo (22 €) kal la nokto-pago (25 €) ne estos redonitaj
en okazo de neĉeesto aŭ malfrua nuligo (malpli ol tri tagoj)

FIN DE SEMAINE CULTURELLE AU BEAUSSET - 2018
samedi 1er et dimanche 2 décembre

lieu : Maison des Frères, 16 rue Estienne d'Orves – 83330 Le Beausset

ch. avec douche et WC – draps et couv. fournis - apportez serviettes de toilette et de table

comment nous atteindre ? Dans Le Beausset, des panneaux vous guideront. Mais avant :

train : gare de Saint-Cyr ; car : de La Ciotat ou de Toulon;

autobus 13 : 1 € pour étudiants ou 3ème âge (mais vous devez obtenir la carte chez Cars 13)

voiture : autoroute La Ciotat-Toulon, sortie Saint-Cyr

programme : **samedi** dès 9h : accueil, café - 10h/12h : cours – déjeuner - 15h/19h : cours – dîner - 20h30 :

dimanche : 9h/12h : cours ; déjeuner

groupes de travail :

1 : *Mari-Roza Vilain* : conversation pour débutants

2 : *Renée Triolle* : conversation pour “progressants”

3 : *Pascal Vilain* : travail d'étude pour “experts”

repas : Comme d'habitude, Pierre Oliva s'en chargera.

tarifs : adhésion au stage : 22 € (36 € pour un couple) ; pauses café comprises

pension complète avec trois repas, nuit et petit-déjeuner : 58 €

un seul repas avec boisson (si vous désirez seulement manger avec nous) : 12 €

pour informations : Pierre OLIVA - 06 76 55 57 23 / nlpolecamp@gmail.com

à renvoyer avant le 17 décembre avec le paiement par chèque

à: Pierre OLIVA - 99 Eden Parc 2772 Montée du Vieux Camp 83330 LE CASTELLET

nom :

adresse :

courriel :

téléphones (fixe et/ou portable) :

- s'inscrit à la fin de semaine culturelle au Beausset les 1er et 2/12 2018
- choisit le groupe de travail suivant : 1 : 2 : 3 :
- dormira sur place, participera à toute la rencontre et paie donc 58 €
- ou souhaite les repas suivants : samedi midi : samedi soir : dimanche midi :
et paie 12 € x = €
- a un régime particulier (veuillez préciser, nous essaierons de vous satisfaire) :

et paie donc par chèque à l'ordre de Espéranto-Provence

l'adhésion : 22 € (ou 36 € pour un couple) + le séjour : € = total :€

! *l'adhésion (22 €) et la chambre (25 €) ne seront pas remboursées
en cas d'absence ou d'annulation tardive (moins de 3 jours)*